# *Raúl Castro kaj Díaz-Canel akceptis la sekterarion de sekureca konsilio de Rusio*



**Foto: PL**

Havano, mar 1 (RHK) La generalo de la armeo Raúl Castro kaj la prezidento de Kubo, Miguel Díaz-Canel, akceptis ?i-merkredon en Havano la sekretarion de la Rusa Sekureca Konsilio, Nikolai Pátrushev, kiu faras laboran viziton al nia lando.

En la kunveno, la eminentuloj diskutis pri la bonega stato de la rilatoj inter la du nacioj kaj pri ilia estonta evoluo, raportis nacia televida raporto.

Prezidento Díaz-Canel faris oficialan interparolon kun sia rusa ekvivalento, Vladimir Putin, dum vizito al la e?razia nacio en novembro de la pasinta jaro, en kiu ili analizis la nunan staton kaj evoluperspektivojn de la rusa-kuba strategia asocio en la politika, ekonomia, komerca, kultura kaj humanitara sferoj.

Sekve de la kvartaga oficiala vizito, la kubaj a?toritatoj raportis la progreson de kunlaboraj projektoj ?e la ?talentrepreno Antillana de Acero, naftoprospekto kaj produktado en Boca de Jaruco, la rehabilitado de la mekanika fabriko Villa Clara kaj la registrado de la drogo Heberprot-P.

Fonto: PL

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/315359-raul-castro-kaj-diaz-canel-akceptis-la-sekterarion-de-sekureca-konsilio-de-rusio

**Radio Habana Cuba**